# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-07 n-ro 378


## En 2016, 200 personoj estis mortigitaj, ĉar ili defendis la naturmedion, laŭ Internacia Amnestio




234 homoj mortigitaj en konfliktoj en jemena ĉefurbo Sanao

Ĉu AlphaGo, kiu venkis homan go-majstron, povos efike instrui goon?

Ĉina Saihanba Arbarkulturejo gajnis plej altan premion de UN pri medio

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

En 2016, 200 personoj estis mortigitaj, ĉar ili defendis la naturmedion, laŭ Internacia Amnestio
*Ĉar ili defendis siajn rajtojn p. 03*

234 homoj mortigitaj en konfliktoj en jemena ĉefurbo Sanao
*Kaj 400 aliaj estis vunditaj p. 04*

Libana ĉefministro Hariri retiris sian rezignon
*Kio metis finon al la ŝtormo estigita de li p. 04*

Ĉina *Saihanba* Arbarkulturejo gajnis plej altan premion de UN pri medio
*Monda plej granda artefarita arbaro p. 05*

Ĉu *AlphaGo*, kiu venkis homan go-majstron, povos efike instrui goon?
*Google kaj go-lernejo p. 05*

Kreiĝas la scienca centro *Astrocent*
*Detektado de la gravitaj ondoj p. 06*

La nova plej bela knabino
*6-jaraĝa rusino p. 06*

Nova specio, sed ne tra mutacio
*Nova hibrida birdospecio p. 07*

# En 2016, 200 personoj estis mortigitaj, ĉar ili defendis la naturmedion, laŭ *Internacia Amnestio*

Laŭ *Amnestio Internacia*, 281 personoj estis mortigitaj en la mondo en 2016, ĉar ili defendis siajn rajtojn. Inter ili, 200 defendis siajn terojn aŭ la naturmedion, laŭ raporto publikigita de la NRO marde la 5-an de decembro. *Amnestio Internacia* taksas je 3 500 la nombron de defendantoj de la homaj rajtoj murditaj en daŭro de dudek jaroj. Inter ili, la nombro de defendantoj de la naturmedio estas pli kaj pli alta. La NRO decidis do engaĝiĝi ĉi-jare en la protektado de kelkaj el ili.




**Aktivuloj estas malliberigitaj, aliaj murditaj**

Lia domo jam estis incendiita, kaj li ne plu kalkulas la minacojn ricevitajn, sed Clovis Razafimalala estas nelacigebla defendanto de la arbaro de Madagaskaro kontraŭ la ŝakristoj de rozligno.

Tiu altvalora materialo spertas tamen internacian embargon. Tiu madagaskara informadikisto 47-jara luktas kontraŭ krimuloj sen granda subteno de la aŭtoritatoj.

**«Ni ĵus fariĝis la ĉefaj malamikoj de la ŝakristoj kaj de kelkaj personoj en la registaro»**

Li suferis premojn. «Mi estis malliberigita post publika manifestacio, kvankam mi ne estis ĉe la loko». Malgraŭ la malfacilaĵoj, Clovis sin sentas bonŝanculo, kompare kun aliaj defendantoj de la naturmedio en Madagaskaro. «Unu estas en la nordo de Madagaskaro, li estas policisto pri medio. Li estis mortigita. Aliaj estis mortigitaj en *Mananara* fare de ŝtelĉasistoj».

**Brazilo estas lando, kie estas la plej granda nombro de viktimoj**

La defendantoj de la naturmedio estas minacataj, ĉar ili protektas la teron de siaj praujoj aŭ tiun, kiun ili kultivas por siaj nutraĵbezonoj. Ili suferas premojn de ŝtelĉasistoj, kaj ankaŭ de koruptitaj funkciuloj de kelkaj Ŝtatoj, kiuj ne enketas pri la murdoj, aŭ kiuj partoprenas en malaperigo de la aktivuloj.

La raporto kondamnas la ekspluatadon de la palmoleo, de la ercoj, kaj la industrian poluadon. Brazilo estas unu el la plej danĝeraj landoj por aktivuloj pri naturmedio, kun 66 membroj de la Brazila Komitato de Defendo de Homaj Rajtoj mortigitaj en 2016.

**Pli bonaj kondiĉoj danke al *Amnestio Internacia***

Laŭ Camille Blanc, prezidantino de *Amnestio Internacia-Francio*, defendi tiujn aktivulojn estas gravega. «Ni ricevas multajn atestojn de personoj malliberigitaj aŭ torturitaj. Ili deklaras, ke iliaj vivkondiĉoj pliboniĝis, ekde kiam *Amnestio Internacia* subtenis ilin».

Sed tiuj internaciaj mobilizadoj ne ĉiam funkcias. Pasintjare, Berta Cáceres, ekologiisma aktivulino en Honduraso, estis mortigita, kiam ŝi rehejmeniris. Ŝi tamen ricevis la prestiĝan premion *Goldmann*, atribuatan al defendantoj de la naturmedio.

En Filipinoj, Glorian Capitan estis mortigita en sia hejmo, en julio 2016, ĉar ŝi luktis kontraŭ la plivastigo de karbo-uzino.

Neniam Milito Inter Ni

# 234 homoj mortigitaj en konfliktoj en jemena ĉefurbo Sanao

La Internacia Komitato de la *Ruĝa Kruco* por Mez-Oriento diris marde [05 dec 2017], ke la nombro de mortintoj pro konfliktoj en la jemena ĉefurbo Sanao kreskis ĝis 234, kaj 400 aliaj estis vunditaj, inkluzive de 383 severe vunditaj.



Robert MARDINI, regiona direktoro de la komitato, diris, ke iliaj teamoj nun faras ĉion, kion ili povas por provizi hospitalojn per medikamentoj, kirurgiaj materialoj kaj fuelo.

Lunde [04 dec 2017], batalistoj de la grupo *Houthi* mortigis la eksan prezidenton, Ali Abdullah SALEH, liajn parencojn kaj liajn altrangajn asistantojn post tri tagoj de letalaj strataj konfliktoj inter la movado *Houthi* kaj armitaj subtenantoj de SALEH en Sanao.


Oficialuloj el la partio de SALEH subtenata de Saud-Arabio promesis venĝi la morton de sia gvidanto kaj daŭrigi la batalon kontraŭ *Houthi*.

La bataloj unue eksplodis je semajno post kiam la lojalaj partizanoj de SALEH malhelpis membrojn de *Houthi* eniri moskeon administratan de SALEH por sekurigi proksiman religian celebradon organizitan de la grupo sur la placo *Sabeen* en centra Sanao.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Libana ĉefministro HARIRI retiris sian rezignon

Libana ĉefministro Saad HARIRI marde [05 dec 2017] retiris sian rezignon, kio metis finon al la ŝtormo estigita de li.



Tiutage Libana Prezidento Michel AOUN prezidis specialan kunvenon de la kabineto, la unuan kunsidon de la kabineto post kiam HARIRI deklaris demision la 4-an de novembro.

En deklaro publikigita post la kunveno, la kabineto bonvenigis lian retiron de la rezigno kaj unuanime aprobis la novan politikon ne implikiĝi en regionaj konfliktoj. Ĉiuj politikaj frakcioj de la lando promesis, ke ili ne enmiksiĝos en iun ajn regionan disputon, konflikton aŭ militon kaj estos fidelaj al tiu politiko.

HARIRI subite deklaris rezignon pri ĉefministreco la 4-an de novembro dum sia vizito en Saud-Arabio kaj akuzis Iranon kaj ĝian agenton *Hezbollah* pri interveno en aferojn de arabaj landoj. Sub la mediacio de Francio, HARIRI revenis al sia lando la 21-an de novembro kaj deklaris ke li prokrastas la rezignon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Ĉina *Saihanba* Arbarkulturejo gajnis plej altan premion de UN pri medio

Marde [05 dec 2017] dum la 3-a Media Asembleo de UN, okazinta en Najrobio, ĉefurbo de Kenjo, la Programo de UN pri Medio deklaris, ke la konstruantoj de la ĉina *Saihanba* Arbarkulturejo gajnis la premion de Ĉampionoj de la Tero, la plej altan premion de Unuiĝintaj Nacioj pri mediprotekto.




La Saihanba Arbarkulturejo situas en la norda parto de *Hebei*-provinco, norda Ĉinio, kaj okupas 93 000 hektarojn. Antaŭe pro troa arbohakado, la tero tie estis sterila, kaj sablo de dezertoj en la norda parto de Ĉinio estis alblovita al Pekino trans *Saihanba*. Ek de la jaro 1962 tri generaciaj konstruantoj pene laboras en *Saihanba* kaj plantis la mondan plej grandan artefaritan arbaron kun la areo de 1,12 milionoj da muoj [亩 mǔ] (preskaŭ 75 000 hektaroj), kaj plialtigis la arbarkovritan kvanton de 11,4% ĝis 80%. Ili verdigis la dezerton kaj kreis miraklon.

Shanshan
Ĉina Radio Internacia

---

# Ĉu *AlphaGo*, kiu venkis homan go-majstron, povos efike instrui goon?

La 4-an de decembro, *Google* kaj la go-lernejo *Nie Weiping* [聶衛平 Niè Wèipíng] kune lanĉis la staĝon "Serĉi junajn go-pionirojn en Ĉinio", kiu celas popularigi goon. La go-lernejo *Nie Weiping* estas la plej influa lernejo pri goo en Ĉinio. Ĝi celas elekti kaj trejni geknabojn kun talento en goo kaj tiel daŭre oferti talentulojn al la ĉina rondo de go-ludistoj. Kvankam *AlphaGo* kaj la lernejo antaŭe estis rivaloj, nun ili fariĝis kunlaborantoj.




"*AlphaGo*, kiu antaŭe venkis la plej bonan profesian go-ludiston, instruos goon al amatoroj. Mi bonvenigas tion ĉar mi bonvenigas ĉion kio helpas popularigi goon", diris la go-majstro NIE Weiping.

Sundar PICHAI, ĉefa administranto de Google demandis la go-majstron NIE Weiping: "Ĉu vi pensas, ke la instrua maniero de *AlphaGo* estas bona?" NIE Weiping respondis: "Mi pensas, ke profesiaj ludistoj devas akcepti la manieron kaj koncepton de *AlphaGo*. Nun la profesiuloj jam aplikas ĝian manieron kaj ĝin trovas efika."

ZHAO Zhelun, ĝenerala direktoro de la lernejo, rimarkigis ke estas granda merkato por go-trejnado en Ĉinio. Multaj gepatroj ne esperas ke iliaj geknaboj fariĝos profesiaj go-ludistoj, sed ili pensas ke goo povas trejni la infanojn en logika pensado, koncentriĝo, disvolvo de intelekto kaj memorado.

GAO Shuyuan
El Popola Ĉinio

## Kreiĝas la scienca centro *Astrocent*



Esploroj ligitaj kun la detektado de la gravitaj ondoj kaj malluma materio estos la ĉefa agadsfero de la internacia scienca centro *Astrocent* en Varsovio. Ĝi kreiĝas kadre de la 2-a konkurso de la programo Internaciaj Esploragentejoj realigata de la Fondaĵo favore al la Pola Scienco.

La plej grava tasko de *Astrocent* estos malkovrado kaj esplorado de enorme malfortaj signaloj kaj kaŝitaj informoj en fiziko, aparte en la esplorado de la Universo. La ĉefaj agadsferoj estos esploroj ligitaj kun la planataj eksperimentoj pri detektado de gravitaj ondoj kaj malluma materio. Ambaŭ apartenas al fundamentaj problemoj kaj samtempe plej ekscitaj sferoj de fiziko kaj astrofiziko de partikloj, koncerne kiujn en la lastaj kelkdek jaroj okazis senprecedencaj malkovroj.

Jam nun eblas paroli pri almenaŭ tri praktikaj aplikoj de teknologiaj atingaĵoj de *Astrocent*. Unue, temas pri inteligentaj algoritmoj por alifarado de enorme ampleksaj kolektoj de donitaĵoj kaj selekta ekstraktado de informoj. Due, temos pri evoluigado de moduloteknologio de fotondetektiloj. Trie, temos pri esplorado de sismosentigilaj kompleksoj necesaj en detektiloj de gravitaj ondoj, kiel LIGO. Ili povos esti utiligataj ankaŭ por serĉado de petrolo aŭ frua avertado kontraŭ tertremoj.

Pola Retradio

---

## La nova plej bela knabino







Post la kreskiĝo de la franca manekeno Thylane Blondeau, kiu nuntempe estas 16-jaraĝa, ŝajne la nova plej bela knabino de la mondo estiĝis: la 6-jaraĝa rusino Anna Knjazeva [Анна Князева].

Thylane faris historion kiel la plej juna manekeno, kiu pozis al la moda revuo *Vogue*, kiam ŝi estis nur 10-jaraĝa. Nun la junulino progresas kiel manekeno.

Anna, kvazaŭ bela pupeto, jam brile ludis kiel manekeno je reklamaj kampanjoj en sia naskiĝlando kaj aliande tra Eŭropo.

Nuntempe tiu "elekto" de Anna venas el ŝia famiĝo ĉe la socia retejo Instagramo, kie ŝia konto kalkulas je pli ol 530 mil sekvantoj. La konto estas kontrolata de ŝia patrino, kaj ĝi estas plena je fotoj pri tiu knabineto kun glata, kaŝtankolora longhararo, franĝo kaj bluokuloj (vidu).

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Nova specio, sed ne tra mutacio

En la mezo de la 19-a jarcento, Karlo DARVINO [Charles DARWIN [ʧɑːlz ˈdɑːwɪn]] enkondukis ideojn, kiuj markis la sciencon kaj nian komprenon pri la mondo. Lia verko "*La Origino de Specioj*" (1859), provis klarigi la manieron, kiel aperis en la mondo la grandega kvanto da malsamaj vivuloj. Per hazardaj ŝanĝoj en la biologia strukturo de individuo de unu specio kreiĝas nova ento, kaj ĉi tiu plu vivas kaj transdonas la ŝanĝon al siaj idoj, laŭ ĝia kapablo adaptiĝi al la medio. Oni nomis tion "teorio pri evoluado de specioj". Evidente, ĉi tiu klarigo estas tro simpla, des pli ke la darvina teorio poste miksiĝis kun aliaj kontribuoj de la scienco.




Tamen, ĉi tie gravas nur, ke la kontribuo de DARWIN kaŭzis skuon tra la mondo. Kompreneble, ĝi rekte kontraŭis la religian, biblian, informon, ke Dio kreis ĉiujn estaĵojn en kelkaj tagoj – la tiel nomatan "Kreismon". Ĝis nun religiaj pensmanieroj kontestas la darvinan "Evoluismon". Fakte, iom vana konfronto.

Lastatempe, la darvina flanko gajnis plian forton, pro la eksterordinare bela laboro de du gesciencistoj en la Galapagoj. Ili simple dokumentis kaj akompanis dum kvardek jaroj la aperon de nova specio en la naturo. Temas pri nova birdo. En la jaro 1981, ili rimarkis la alvenon de iu birdo, kiu ne estis indiĝena en la insulo. Ĝi devenis el tiel malproksima loko, ke ĝi ne sukcesis flugi revene. Ĝi restis kaj koitis kun indiĝena femalo de alia specio. Naskiĝis ido kaj kun ĝi sinsekvo de nova hibrida birdospecio.

En pasinta tempo, oni supozis, ke interkruciĝo de malsamaj specioj ne povus produkti fekundajn individuojn. Nuntempe, oni ne nur dokumentis tion, sed krome, ke la anoj de la nova birdogrupo en Galapagoj interkruciĝas nur ene de la nova specio. Tio povas okazi ankaŭ al aliaj animaloj.

Sekve, pliampleksiĝas la teorio de DARWIN: novaj specioj rezultas ne nur de mutacioj, sed ankaŭ de hibridigo. Ordinare, idoj de malsamspecia paro malbone adaptiĝas al la medio. En ĉi tiu okazo, la novaj insulaj birdoj estas pli grandaj ol la indiĝenoj kaj trovis novajn nutraĵojn por si. Pro tio, oni nomas ilin "grandaj birdoj". Oni analizis ilian genetikan strukturon kaj konfirmis, ke temas pri "fermita" grupo, koncerne reproduktadon: dum jaroj ili reproduktiĝas nur inter si. Tion kaŭzis ankaŭ la fakto, ke indiĝenaj femaloj ne povas rekoni la kanton de maskloj de la nova specio, kaj tio malhelpas pariĝon. Kompletiĝis do "natura selekto" tra hibridigo.

Oni registris do fenomenon, kiu konfirmas la teorion de DARWIN, tamen ne tra mutacio. La Naturo estas mirinda, sed ne malpli mirinda estas la talento, obstino kaj pacienco de tiuj biologiistoj!

Paŭlo Sergio VIANA
Esperanta Retradio